Theodor Fontane,

Bona konsilo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Somere dum mateno
Ekmigru en la fru'!
Forfalos la ĉagreno,
Malĝojos vi ne plu.

Serena blu' de l' ĉielo,
La koron eniĝas ĝi,
Samkiel la Dia fidelo
Tegmentas super vi.

Ĉirkaŭas flor-ornamo
Kaj spikoj ĉie ĉi,
Kaj estas, kvazaŭ la amo
Kuniras apud vi.

Hejmecon ĉio sentigas
Samkiel ĉe l' patrin',
Kaj alten eksvingigas[2]
L'animo gaje sin.

Traduko de la Germana poemo "Guter Rat" de Theodor Fontane *(Teodoro Fontano, ∗1819-12-30 – †1898-09-20) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983-01-29.*

MR-031-2 / Arg-291-590 (2012-12-26 21:46:10)

[2] aŭ pli konforme al la originalo: Kaj super l'alaŭdon svingigas